

**ABONPREZO:**

Por Bulgarujo — 30 leva  
 Por Eksterlando - 2 sv. fr. Aparta n-ro 4 lv.

**ANONCPREZO:**

Komerconcoj - 2 lv. kv. cm.; koresponda - 10 lv.

**ADRESO:**

REDAKTEJO kaj ADMINISTREJO  
 str. „P. MAGLOV“ 4, RUSE. TEL. 553;

Redaktoro: IVAN KOTOV.

## Plenumu vian devon!

En Vraca dum la kongreso regis granda entuziasmo. Ĉiu diris sian pezan vorton, kiel labori, kiel agi kaj finfine kun gojo kaj kantoj ni foriris hejmen.

Ĉu nia entuziasmo estas efemera aŭ tia de prudentaj homoj. Vere entuziasmigita persono devas konservi gin tutan jaron ĝis la venonta kongreso kiam ni refresigos kaj vigligos gin.

Ĉar ne ĉiuj plenumis la promeson, ni estas igataj, skribante ĉi liniojn, rememorigi ilin **la devon de vera esperantisto.**

Al niaj alvokoj reehis malgrandnombro da gesamideanoj kies atenton al la C. K. meritas dankon. Sed bedaŭrinde la plimulto de nia gesamideanaro silentas, atendante plurajn instigojn. Tamen la silentado ni devas eviti kaj anstataŭigi per aktiveco kaj vigleco por akiri la revatan asocistabiligon.

Ni atentigis la samideanaron pri nia **verda semajno**, sed tamen la sama letargieco-respondis nur kvar societoj, sendintaj monon pri la presigo de propagandiloj laŭ la kongresdecidoj. Sen monrimedoj la C. K. povas nenion fari, tiele la societoj ja mem prizorgu la organizon de l' verda semajno.

Fakto tre malgoja ankaŭ estas, ke ĝis nun nur **250** abonatoj subtenis la organon.

Ĉu nur tiom da esperantistoj estas en nia lando?

Do, rememoru vian sanktan promeson kaj plenumu vian esperantan devon kaj nur tiam la movado facile supreniros la krutan vojon.

Supren la kapo kaj iru vojon celitan!

### ESPERANTISTA FESTO

La XIX-a kaj XX-a jarcentoj estas epoko de l' inventaĵoj mirigindaj. Multaj inventistoj prezentas siajn eltrovaĵojn, ĉu sciencaj, ĉu teknikaj tre bezonaj por la nuntempa progresanta homaro.

La nova epoko naskis geniulojn, kies geniaĵoj oni akceptis en la komenco nekredeme, priridinte la ties elpensintojn. Sed spite la malesperigan publikopinion la kulturaj agantoj laboris senhalte kaj kurage kaj igis per la konstanta esperigo kaj laboro konvertigi la vastan publikon.

La renesanco sukcesis influi la publikon.

Dum tiu periodo multaj scienculoj penis solvi la nesolveblan problemon-elpensi universalan helplingvon. Vanaj klopodoj Centoj da projektoj. Fine devis naskigi la Majstro de la lingvokreo.

La 15-an de decembro 1859 jaro en la malgranda pola urbo Bialystok naskiĝis la genia persono D-ro Lazar L. Zamenhof, kiu trafis la efektivan slosilon, kreinte la nuna Esperanto.

Hodiaŭ la tutmonda geesperantistaro festas la 69-a datreveno pro la naskdato de nia eterne vivanta Majstro Zamenhof. Festante tiun daton, ni ĉiam memoru lian testamenton, sekvante severe la fundamenton.

Konkorde, kaj brave ni la apostoloj posteuloj daŭrigu la laboron, bazanta sur neŭtraleco kaj fideleco. Novaj progresoj ni atendas! Ni laboru!

D. IVANOV.

# LITERATURO.

EMANUIL POP DIMITROV.

## KARBOMINISTOJ.

Sub ter', en mallumaj tuneloj, kun lampoj tremantaj,  
 ĉe marĉoj kaj ties malseka, mucida odor',  
 en pozoj turmentaj, kun manoj sangantaj—Atlantoj—  
 subtenas la arkojn de tiu palaco de l' Mort'.

De l' nigra kaj glanca karb' ili fosadas la koron,  
 la koron pasian de l' granda patrino — la ter':  
 la proprajn infanojn en la superpova laboro  
 la ter' entombigis, senigis de ĝoj' kaj liber'!

La pensoj — obskuraj, la revoj — fumantaj ĝardenoj,  
 kaj tie nur sonĝojn — inkubojn suferas rigard'.

Sed ili konstruas la ferparadizon lumplenan  
 en kiu ne estos tiranoj, ne estos malsat'.

Pro lac' ili sur la manplatoj apogas la fruntojn,  
 kaj vidas lumtagon en sonĝa nedaŭra frenez',

kaj kaptas fosilojn, kaj boras la nigrajn profundojn,  
 sed — sun' ne lumigas la fendojn en tera la mez',

Sufokas l' aero venena, sekigas la febro.

Jen sur la brankardo trafita de l' morto minist' —

tintadas katenoj, postiras la multaj funebraj,  
 kaj kvazaŭ portadas la korpon vakspalan de Krist'.

Trad. MITI.

## MORTIS MIA INFANO.

Mia lasta sunradio

Etingita nun por mi,

Mia vivo nun soleca

Malfeliĉa estas mi.

Mia kara infaneto

Min forlasis nun por ĉiam,

Tre doloras mia koro,

Mi revidas ĝin neniam.

Mi nun devas trapasadi

Mian vivon senĝojante,

Lasta sunradio mortis

Min nur sola restlasante.

Käte Haselbauer

Austrujo.

**Gesamideanoj varbu novajn abonantojn!**  
**Ĉu 250 abonantoj estas sufiĉe por la regula**  
**aperado de nia kara „B E“?**

**Обръщаме вниманието на съидейниците да**  
**съобщаватъ точните си адреси за да се избѣгватъ**  
**излишни преписки и връщане пратките.**

**На неточни адреси не ще се отговаря.**

## LA PARABOLO PRI LA ĈASISTO.

DE OLIVE SCHREINER.

Estis iam ĉasisto en la valoj. Tagon post tago ĉasis li sovaĝajn birdojn en la arbaroj. Okazis foje, ke li staris ĉe la rando de granda lago. Dum li atendis la alvenon de la birdoj, kaŝinte sin en la kanoj, granda ombro falis sur lin kaj li ekvidis en la akvo ian reflektadon. Li rigardis supren al la ĉielo por vidi, kio ĵetis la ombron, sed ĝi jam estis malaperinta. Tiam ekkaptis lin bruldeziro revidi tiun reflektadon en la akvo; li komencis atendi kaj rigardadi. Pasis for la tuta tago, venis la nokto, sed la mistera reflektadon ne plu aperis.

Tiam li iris hejmen kun sia malplena sako, malgaja kaj silenta. Liaj kamaradoj per d mandado penis ekscii la kaŭzon, tamen li respondis nenion, sed nur sidis sola kaj primeditadis la okazintaĵon.

Tiam venis ĉe li lia amiko kaj al tiu li ekparolis:

— Mi vidis hodiaŭ ion, kion mi neniam antaŭe vidis — grandan blankan birdon, kun arĝentaj flugiloj, ŝvebanta al la eterna bluo. Kaj nun estas al mi, kvazaŭ granda fajro bruladas interne de mia brusto. Vere ĝi estis nur ekbrilo luma reflektado en la akvo, sed nun mi nenion en la mondo pli deziras ol la feliĉon povi ĝin teni enmane.

Lia amiko ridis.

— Estis nur lumradio brilanta en la akvo — diris li — aŭ la ombro de via propra kapo. Trankviliĝu, amiko mia, morgaŭ vi certe forgesos ĝin.

Sed venis la morgaŭa tago. Ĝin sekvis alia, post ĝi venis la tria kaj la ĉasisto vagadis sola. Serĉadis li en la grandaj arbaroj, en la apudlagaj arbaretoj, inter la kanoj, sed la birdon kun arĝentaj flugiloj li ne povis trovi. Li ne plu pafis birdojn; kial li bezonas ilin?

— Kio okazas al li? — demandadis sin liaj kamaradoj.

— Li estas freneza — diris unu.

— Ne, pli malbone — diris alia — li volas vidi tion, kion neniu alia iam vidis, kaj tiel fariĝi mirindulo.

— Nu, ni evitadu lian kuneston! diris ĉiuj.

De tiam la ĉasisto estadis ĉiam sola.

Unu nokton, kiam li vagis en mallumo, kun peza koro kaj ploremo, subite antaŭ li aperis maljunulo, pli granda kaj majesta ol ĉiu el la filoj de la tero.

— Kiu vi estas? mirigite demandis la ĉasisto.

— Mi estas la Saĝo — respondis la maljunulo — sed iuj homoj nomas min Scio. La tutan mian vivon mi pasigis en ĉi tiuj valoj, sed neniu homo povas min vidi, escepte de tiu, kiu treege

— Mi foriros.

(Dadrigota)

malĝojas. La okuloj, kiuj kapablas min vidi, devas esti larmo-plenaj kaj laŭ la suferoj de la homo mi parolas.

La ĉasisto ekkriis:

— Ho, vi kiu tiel longe ĉi tie vivadis, diru al mi, kio estas tiu granda sovaĝa birdo. Oni volas kredigi min ke ĝi estas re-vaĝo, aŭ la ombro de mia propra kapo.

La malgunulo ridetis.

— Ĝia nomo estas vero. Tiu, kiu nurfoje ĝin vidis, ne plu povas ripozi, kaj ĝismorte li deziras ĝin.

Kaj la ĉasisto ekkriis:

— Ho, diru al mi, kie mi povas ĝin trovi.

— Vi ankoraŭ ne estas sufiĉe suferinta — diris la maljunulo kaj foriris.

Tiam la ĉasisto elprenis el sia brusto la teksilon de Imago, metis en ĝin la fadenojn de siaj Deziroj kaj la tutan nokton li teksadis reton. Matene li sternis la oran reton sur la tero kaj ĵetis en ĝin kelkajn grajnoj de Kredemo, kiujn li heredis de sia patro, portante ilin ĉiam ĉe sia brusto. Ili similis blankajn aerpilkojn, el kiuj, se estis piedfrapataj, eliĝis bruna polvo. Tiam li sidiĝis por atendi la rezulton.

La unua, kiu venis en la reton, estis neĝblanka birdo kun kolombaj okuloj.

— Homa Dio!... Homa Dio!... kantis ĝi.

— Due venis nigra kaj mistika birdo, kun belege helaj okuloj, kiuj enrigardas ĝisfunde en la animon.

— Senmorteco!... Senmorteco!... kantis ĝi.

Kaj la ĉasisto prenis ilin ambaŭ en siajn manojn, ĉar li diris al si mem:

— Sendube ili estas el la bela familio de la Vero.

Tiam alflugis alia, orverda, kantanta per akresona voĉo simile al kianto en vendejo, birdo:

— Rekompencon post Morto!... Rekompencon post morto!...

La ĉasisto diris al ĝi:

— Kvankam vi estas iom malpli bela, vi tamen havas sufiĉe da beleco.

Kaj li prenis ankaŭ ĝin

Kaj venadis aliaj birdoj. Belaj, brilkoloraj kantantaj belsc-najn dolĉajn kantojn, ĝis kiam finiĝis la grajnoj. Tiam la ĉasisto kolektis ĉiujn siajn birdojn kaj metis ilin en fortikan feran kaĝon, kiun li nomis Nova kredo. La popolo ĉirkaŭadis ĝin, dancante kaj kantante.

— Ho, feliĉa ĉasisto!... — kriadis ĉiuj — Ho, mirinda homo!... Ho, ravaj birdoj kaj belegaj kantoj!...

Neniu volis scii de kie venis la birdoj, nek kiel ili kaptiĝis, sed oni nur dancis kaj kantis ĉirkaŭ ili. — Kaj ankaŭ la ĉasisto estis ĝoja, ĉar li diris al si:

— Ne pre ankaŭ la Vero estas inter ili. Post iom da tempo ĝi senplumiĝos kaj mi vidos ĝian neĝblankan figuron.

Sed la tempo pasis, la popolo kantis kaj dancis, tamen la koro de la ĉasisto pli ŝarĝiĝis. Li ŝteliradis for, kiel antaŭe, por plori; la fortega deziro denove vekigis en lia brusto. Iun tagon li restis sola kaj ploris. Tiam saĝo reaperis al li. La ĉasisto rakontis al la maljunulo, kion li estas farinta.

Saĝo malgaje ridetis

— Multaj homoj — li diris — jam preparis sian reton por la Vero, sed ili neniam kaptis ĝin. Per la grajnoj de kredeno ĝi ne povas sin nutri; en la reto de deziroj ĝi ne povas kaptiĝi; la aeron de tiuj ĉi valoj ĝi ne povas spiri. La birdoj, kiujn vi kaptis, estas el la idaro de la Mensogo: ĉarmaj kaj belegaj, sed tamen... mensogaj. La vero ne konas ilin.

La ĉasisto ekkriis maldolĉe:

— Ĉu mi devas do kviete sidadi kaj lasi min esti turmentata de tiu ĉi bruldeziro?

Diris la maljunulo:

— Aŭskultu! Pro tio, ke vi multe suferis kaj ploris, mi diros al vi tion, kion mi scias. Tiu, kiu komencis la serĉadon de la Vero, devas por ĉiam forlasi tiujn ĉi valojn de superstiĉo, kunprenante nek pecon de io, kio apartenis al ili. Sole li devas vagi en la landon de Sinoferado kaj Rezigno. Li devas tie vivadi kaj ĉiel kontraŭstari tentaĵojn. Kiam la lumo ekaperas, li devas leviĝi por ĝin sekvi en la landon de hela sunbrilo. La montoj de la severa realeco aperos antaŭ li kaj ilin li devas surgrimpi. Super ili troviĝas la Vero.

— Kaj li firme tenos ĝin en siaj manoj! ekkriis la ĉasisto. La Saĝo kapneis.

— Li neniam ĝin vidos, neniam ĝin tenos. Ĉar ne venis ankaŭ la tempo.

— Ĉu estas do nenia espero? plore diris la ĉasisto.

— Estas — rediris Saĝo — Kelkaj homoj jam grimpis sur tiuj montoj. Rokon post roko ili suprenrampis. Kaj vagante tie, en tiuj altaj montregionoj, kelkaj okaze trovis sur la tero nur unu blankan, arĝentan plumon, falintan el la flugiloj de la Vero. Kaj ne pre okazos — daŭrigis la maljunulo, leviĝante kaj profete mangestante al la ĉielo — ke kiam sufiĉe da tiaj plumoj estas kolektitaj de homaj manoj kaj estos teksitaj en ŝnuron, kaj la ŝnuro en reton la Vero kaptiĝos en tiu reto. Car nur Vero povas teni la veron.

La ĉasisto leviĝante diris:

— Mi foriros.

(Daŭrigota)

# ESPERANTISMO.

## (2) AL KIU PROPAGANDI ESPERANTON.

Tute ne miriga estas la respondo: ĉirkaŭpreni la abstinencan ideon aŭ turistiĝi estas facile, ĉar ĉe tio neniu devigas al lernado de lingvo, estu ĝi eĉ la plej facile. Mi estas firme konvinkita: hodiaŭ sur la tuta terglobo la interna ideo sendube havas multajn milionojn da adeptoj, kiuj tamen ne estas esperantistoj. Ties nomo estas humanistoj.

Do, ni propagandu! Ni konvinku, ni konvertu la homojn, ni fabriku novajn samideanojn! Ĉielmaniere: per la ĝisnun aplikataj metodoj, per aranĝado de verdaj semajnoj kaj publikaj paroladoj, per vasta kaj elokvante konvinka afiŝado, per ĉiaj permesataj rimedoj, por atentigi kiel eble plej grandan publikon. Sed ni restu certaj pri la rezulto: niaj kursoj akiros kelkdekojn da lernemuloj, sed la vasta publiko restos silenta, indiferenta.

Kial tiu nekontentiga rezulto? Ĉar ni serĉas kapti niajn viktimojn por feliĉigi ilin inter la praktika, luktanta kaj atentanta nur la ĉiutagon. Deviga leĝo por ĝi estas la vivbatalo, ĉefprincipo — unuj super aliajn. Idealismo signifas por ĝi utopion, mono egalvaloras idealon.

Lasu do ĝin! Esperantismo ne estas por ĝi. Kristo diris ne donu la perlojn al porkoj!

Serĉu ilin: la intelektulojn, humanistojn, la viraĵojn de naskiĝo internaideanojn. Serĉu ilin, por kiuj konstanta pliriĉigo de l' intelekto, plialtigo de l' spirito valoras multege pli ol mono. Serĉu ilin, kiuj soifas sciojn kaj konojn, kiel la soifanto — akvon la disventrulo — monon. Serĉu kaj vi trovas ilin. Kaj esperantistigi iun el ili estos pli valora ol tutan legion da praktikuloj, kiuj tuĵ sin demandos, kiel profiti esperanton.

Ne fre insistu kaj ne tre akcentu la lingvecon de esperanto, kiam vi konvertas iun el ili — la aspirantoj por pli ideale, pli homa vivo kaj ordo, la adeptoj de paco kaj harmonio sur la tero. Ne tro klarigu, ke esperanto estas la reciprokan interkomprenon de la popoloj, ĉar li rajte respondos al vi: eĉ esperanto ne povas konduki la popolojn al fina interkompreniĝo, se ĝi estas nenio pli ol nur lingvo internacia. Vi ja vidas frato mia, ke nur lingvo ne sufiĉas: naturaj samlingvanoj ne nur ne komprenas sin, sed despli forte interbatalas per frazoj kaj agoj kaj uzas la komunan lingvon per trompi sin reciproke.

Li parolas konvinkite per ekzemploj kaj vi devas konsentian opinion, ke nur lingvo ne sufiĉos.

Ekparolu tiam al li, ke la lingvo estas manifestiĝo de la ideo, kiu ĝin naskis. Klarigu al li la vorton „samideano“ ka finu



per la konkludo, ke nur la interna ideo kondukos la homaron al fratiĝo. Kaj tiam, estu certa, ke li etendos sian manon al vi kaj volonte eklernos esperanton. Li estas konvertito kaj estos vera paca batalanto.

Al aliaj iom malpli idealemaj kaj tamen senlace serĉantaj novajn kaj novajn sciojn, vi parolu pri la vastaj horizontoj de sciado, kiujn malkovras esperanto. Ellerni iun ajn lingvon signifas scii duoble pli multe.

Sed nun aperas ankaŭ la demando: kiel trovi tiujn intelektulojn kiel distingi ilin de la cetera publiko kaj kiel ankaŭ certi, ke ili fariĝos veraj esperantistoj?

Estu certaj, karaj samideanoj, ke vi ne trovos ilin per aliŝoj, en kiuj ja ne povas esprimiĝi la interna ideo. Ne helpas ankaŭ flugfolioj, nek publika propagando, nek amuzfestoj. Trovi ilin povas ĉiu el vi aparte, persone konvini kaj lernigi ilin. Jen al vi agadkampo por plenumi vian duan devon — esperantistigi.

Ĉiu esperantisto estas pli—malpli idealisto. Alie li ne estus esperantisto. Ĉiu samideano havas amikojn, konatulojn, kolegojn kaj proksimulojn. Jen la rondo en kiu ĉiu el vi devas labori. Estas konata vero, ke du homoj povas amiki, nur se ili havas pli malpli samajn mondkonceptojn, vidpunktojn, samajn ideojn kaj preskaŭ saman intelektantecon. Bone, sed kiel estas klarigebla la fakto, ke la plej bona amiko de fervora esperantisto mem ne estas tia kaj ne interesiĝas pri la movado? Ĉu li, havante ĉiujn kapablojn kaj ideojn de la esperantisto, ne povas ellerni la lingvon kaj fariĝi adepto de la interna ideo? Sendube, li povas tion, se la esperantisto havas nur iom da zorgo pri li. Do, per malmulte da vortoj mi montras al vi, kiuj vi devas pleje peni esperantistigi — viajn amikojn, viajn konatulojn. Kaj ne nur dum la verda semajno aŭ en la kursoj. Ne nur en la kursoj estas lernebla esperanto. Eĉ plej bone ellernas ĝin tiuj, kiuj lernas hejme, sola, nur per lernolibro kaj vortaro. Vi ne devas ĉesi admoni viajn amikojn kaj kolegojn pri la esperantismo. Instruu al ili la lingvon, tute volonte, eĉ penseton ne havanto pri pago.

Kiaj estas la mezuriloj por la vera esperantisteco? Unue, la grado de lingvoposedo, due, la nombro de la konvertitoj kaj trie, la subteno de la movado per kotizoj, abonoj kaj aliaj monofroj. Esperantistoj, ĉu vi ĉiam konsideras tiujn tri gravajn devojn viajn? Konsideru kaj plenumu ilin por raite kaj digne porti la verdan stelon, emblemon de interna ideo. Neniu esperantisto devas silente preterlasi eĉ la plej malgrandan okazon por gajni iun al nia sankta afero, se li supozas kaj esperas nur iom da sukceso.

Kaj ĉiu devas fari tion volonte, fervore kaj sindone, kun la firma kredo, ke li laboras kaj plenumas nian grandan aferon. Ĉiu el vi devas por ĉiam elkapigi la penson postuli kian ajn pagon de personojn, al kiuj vi instruas la lingvon private kaj aparte.

Male, ĉiu el vi volonte kaj senpage devas disponigi vian tempon kaj eĉ lernolibrojn al tiaj dezirantoj, tamen nur en okazo, kiu esperigas vin, ke ili fariĝos veraj, sindonaj esperantistoj

Alie, ne perdu vane viajn fortojn kaj tempon.

Kiu estas tiu arogantulo, kiu postulas parton de la mono por esti kursgvidanto? Ĉu eblas tiel misuzi la grandan taskon kaj honoron instrui kaj gajni por esperanto kelkdekojn da homoj? Sendube, la kursoj devas esti pagataj. Sed ne ĉefe por gajni monon ni devas postuli pagon. La mono estas pleje tial preninda, por ke ni havu la seriozecon kaj fervoron de la kursanoj, kiuj ja nebre deziros havi tion, kion ili jam pagis — ellerni la lingvon. Ni neniam forgesu, ke tiu deziro de ili estas ankaŭ nia ĉefa celo! Ĉu vere vi ne rimarkis kaj neniam pripensis la fakton, ke ĉiujare ni perdas la du trionojn de la konvinkitoj pri la valoro de esperanto. Tio estas la homoj, kiuj eklernis en la kursoj kaj tamen ne finis ilin pro diversaj, tre ofte neklarigeblaj por ni kaŭzoj. Mi certigas vin ke ili estas definitive perditaj por esperanto, ĉar mi konstatis, ke ili neniam aŭ nur maloftege havas la inklignon al denova eklerno. Mi ja tre ofte renkontas homojn, sciantajn la vortojn „alta, malbona, ĉe kiuj tamen la penso denove eklerni la lingvon estas malproksimege. Ĉu la jena indiko sur la afiŝoj: „La kurso por pasintjaraj nefinintaj studintoj estas senpaga“ ne atentigas ilin? Mi emas kredi, ke preskaŭ ĉiuj revenos. Ĉiu el ili diros al si mem: „Pasintan jaron mi estis ne nesufiĉe fervora kaj lernema aŭ vere ne havis tempon, sed ĉi-vintron mi penos eklerni la lingvon“. Ĉe ili certe aperos ankaŭ la ambicio superi la ceterajn kursanojn per siaj lingvakonoj kaj fervoro. Kaj ni zorgu ĉifoje ne reperdi ilin.

Vi tamen ne aprobas ĉi tiun proponon?

Tia okaze, vi ne konsentas mian opinion, ke nia ĉefcelo ne estas kaj ne povas esti mongajni per esperanto. Tio estas celo de la german — aŭ franclingvaj kursoj, sed ĝi neniel povas esti la nia. Kaj konsideru, ke tiuj homoj jam pagis, tiel diri, la enskribkotizon por rajti enveni niĝajn vicojn. Kaj ankaŭ konsideru, ke granda nombro da konvinkitoj alie estus perdita por nia afero. Por ĉiuj novuloj la kurso estas pagata. Kaj la mono plene devas trafi la societatan kason, kiu siaflanke elspezos ĝin nur por esperanto. Mono gajnita per esperanto povas kaj devas esti uzita nur por esperanto. Estas ne vera esperantisto kiu malsame opinias.

Al laboro, samideanoj! Al laboro, fervore, sindone, esperantisme. Al laboro, postulanta monoferojn, tempodediĉon kaj fortuzadon! Laboru kaj laboru, ne demandante: kaj la rekompenco? Ne ekzistas pli glora, pli aspirinda rekompenco ol: la nepoj vin benos. Via laboro la mondon faros feliĉa!

Ni meritu la nomon esperantistoj! Nia klara kaj rekta vojo estu la esperantismo kaj nia ĉefdevizo estu: esperanto super ĉio.

Neniam ni forgesu la sanktan nian promeson: ni juris labori, ni juris batali!

AT. ŜOPOV.

## KVARDEK JAROJ DE L' BULGARA ESPERANTO-MOVADO.

Granda historilibro dediĉita al la kvardekjara jubileo de la esperanto-movado en Bulgarujo — 1889—1929.

### La ĝermo kaj iom da historirememoro.

Tuj post la apero de la Zamenhof'a broŝuro „Dro Esperanto — Lingvo internacia“, troviĝis bulgaroj, kiuj laŭ rusaj aŭ alilingvaj lernolibroj ellernis la ĵus aperin'an helplingvon.

Kaj la postsekvintan 1889 jaron dank'al unu entuziasmita advokato, ellerninta la lingvon dum sia studentvivo en Germanujo, estis presita malgranda lernolibro de Esperanto por bulgaroj. Per ĉi tio kaj per la gazeto „Mondlingvano“ eldonita dum la sama jaro, jam estis metita la fundamento de Esperanto movado en Bulgarujo.

Komencita jam foje, la malforta movado per angoraj, tamen firmaj paŝoj komencis marŝadi antaŭen...

Kaj tagon post tago, jaron post jaro flanke kaj izolitaj de la bulgara societo, en momentoj eĉ mokitaj, la „ekcentri“ aj „pioniroj“ de „unu absurdo-internacia helplingvo“ kun peno fosadas sian sulkon.

Estis nigraj kaj nubozaj tagoj por la juna kaj ne ankoraŭ stabiligita movado, dum kiuj la ekzisto de l' ideo internacilingva estis savita nur dank' al la sindonema agado de kelkaj pacbatalantoj. Tamen ankaŭ estis tagoj ĝojplenaj, dum kiuj la modestaj pioniroj el diversaj urbetoj kaj vilaĝoj renkontiĝadis por ĝui iom da neforgeseblaj tagoj plenaj je frata amikeco kaj homa konsento.

Kaj jen hodiaŭ ĝi — la movado — travivis ankoraŭ unu sortoplenan periodon por komenci novan — eble pli intensan epokon.

### Nia intenco.

La pasintan 1927 jaron tra la tuta mondo, ĉiuj esperantistoj estis festita la kvardekjara jubileo de Esperanto.

Multaj estis la festintoj, kaj diversmaniere oni festis ĝin: — jen unuj en gaja amikeca rondo ĝin festis entuziasme; — duaj kolektiĝis en urbo Danzig por ĉeesti la jubilean internacian Esperanto-kongreson kaj vizitis la tombon de nia Majstro; — kaj jen aliaj pli senbrujaj — tamen pli praktikaj eldonis memorlibron dediĉitan al la kvardekjara jubileo de Esperanto.

Ankaŭ en Bulgarujo iuj amikoj kolektiĝis: — ili parolis, kantis kaj ĝojis... ja estas festo.

Tamen ĝi forpasis, nature kiel ĉiu homa fenomeno — estis forgesita por denove reviviĝi post 7-8 jaroj je la 50-jara, kaj sendube pli intensa jubileo.

Dum la venonta jaro por ni — la esperantistoj en Bulgarujo venos ĝi — la kvardekjara jubileo de nia enlanda Esperanto-movado.

Kaj jen siavice ĝi demandas: — Kiel vi — la bulgaroj — festos min? . . . — Ĉu intime en amikeca rondo, aŭ brue en granda publika kongreso, aŭ modeste vi postlasos ion al la venontaj generacioj, laŭ kio ili ĉiam memoru pri mi?

— Kiel vi, samideano, respondos al ĉi tiu demando?

Ni ne scias ankoraŭ vian respondon, tamen ni jam — eble nur por ni — respondis al ĝi.

— Ni volus dediĉi al nia enlanda kvardekjara jubileo de la esperantista movado en Bulgarujo unu historilibron, entenantan la historion de l' kvardekjara bulgara Esperanto-movado, entenantan bibliografiajn — laŭeble ankaŭ bildajn-nomarojn de niaj pioniroj kaj de la libroj (ankaŭ gazetoj) eldonitaj en Bulgarujo por kaj en Esperanto, kaj fine unu klaran bildon kun adresaro de la hodiaŭa bulgara esperantistaro.

Jen estas ĝi — la intencita intencita de ni por plej bone honori nian kvardekjaran jubileon.

— Ĉu vi konsentas? . . .

O, ni opinias, ke vi sopiras tian libron!

## LIBRO kaj ENHAVO.

### I-a parto - HISTORIO.\*

**Unua ĉapitro.** La ĝermo. Eldono de l' unua lernolibro de D-ro Diodono. La gazeto „Mondlingvano“ — Sofio. Esperanto-pioniroj en la provinco. La movado ĝis 1900.

**Dua ĉapitro:** Plua disvolvigo. Fondo de la klubo „Stelo“ — Plovdiv; „Lumo“ — Tirnovo. Sofio — Esperanto kolegaro.

**Tria ĉapitro:** La unua Esperanto-kongreso en Tirnovo. Fondo de la Bulgara Esperantista Ligo. Organiza vivo de la Bulgaraj esperantistoj. Bulg. Esp-ista Ligo fariĝas Bulg. Esp-anto Societo kun centro Sofio. La movado ĝis la balkana milito.

**Kvara ĉapitro:** La reviviĝo de la movado post la eŭropa milito. Sofio centro de la esperantista movado. Bulgara esperantisto. Supreniro. Krizo. de post 1926. Ekfortigo. Centro en la provinco.

### II-a parto - BIBLIOGRAFIO.

**Unua ĉapitro:** Plena nomaro kun kliŝoj kaj indikoj pri aŭtoroj, eldonjaro kaj konsciza priskribo de la libroj por Esperanto, aperintaj en bulgara lingvo.

**Dua ĉapitro:** Plena nomaro kun kliŝoj kaj indikoj pri aŭtoroj eldonjaro kaj konsciza priskribo de la lernolibroj aliaj lerniloj kaj vortaroj.

**Tria ĉapitro:** Plena nomaro kun kliŝoj kaj klariga teksto pri fondo, aperdaŭro kaj redaktintoj de la gazetoj esperantistaj aperintaj en Bulgarujo

**Kvara ĉapitro:** Plena nomaro kun kliŝoj kaj klariga teksto de la libroj tradukitaj el la bulgara lingvo kaj originalaj eldonitaj en Bulgarujo.

### III-a parto - NUNA MOVADO.

Plena laŭurba kaj-vilaĝa adresaro, entenanta la adresojn de ĉiuj bulgaraj esperantistoj kun rimarktekso pri la urbo aŭ vilaĝo, esperanto-pioniroj kaj societo, laŭpove vidindaĵoj el Bulgarujo.

\* ) La jena enhavtabelo estas nur provaĵo kaj ne estas fiksita. Ĝi akceptos sian finan formon nur post la finpreparo de la libro.

### Kiel ni povos ĝin realigi.

Kiel vi mem vidas, samideano, granda kaj penplena laboro staras antaŭ la iniciatintoj: — kolekti kaj ordigi la abundan historimaterialon, aperintan en la daŭro de kvardek jaroj, kies antikvaĵoj jam estas malfacile troveblaj. Poste dum siaj malmultaj liberaj horoj trafoliumadi ĉi materialon — flaviĝintajn paĝojn... Kaj fine batali kontraŭ la financaj malfacilaĵoj, barantaj la decan eldonon de la libro.

Sed, se la geesperantistaro dezirus helpi al la epoka entrepreno, se ili dezirus per io faciligi la kompiladon de la granda historilibro — ili povas.

Kaj jen — pli malsupre — ni montros nian peton kiel al la jam maluniĝintaj blankharaj pioniroj ankaŭ tiel al ĉiu nuntempa esperantisto.

En la nuna momento ni kontentiĝos nur paroli pri la kolektado de la materialo. Paroli pri prezo de la libro kaj ceteraj financaĵoj — ja nun ni ne povas, kiam ne ankoraŭ ni scias la amplekson, formaton k. t. p. de la libroj.

Do, kiel vi povus helpi?

— Jen! —

Afable ni petas ĉiun malnovan pioniron de Esperanto-movado en nia lando havi la bondeziron konscize transdoni — simile al nia konata malnova s-ano Rjahovski, kiu priskribis sian Esperanto-vivon en „Unua paŝo“ — siajn rememorojn de sia Esperanto vivo.

Ankaŭ la bone konatajn s-anojn laborintajn en la pasinteco, ni petas priskribi la marŝadon de la Esperanto-afero en la Ligo, Societo, Asocio k. t. p.

Ĉio supredirita estas necesa por la unua parto — Historio.

Por la dua — Bibliografio — ni kuraĝas peti ĉiun esperantiston, ĉefe la laborintajn antaŭ la militoj — sciigi nin pri la malnovaj libroj, numeroj el gazetoj kaj ceteraj eldonaĵoj aperintaj en Bulgarujo, kiujn ili posedas, por ke ni povu fari plenan nomaron bibliografian de la libroj, gazetoj k. t. p.

Por la kompilado de plena adresaro de l' bulgaraj esperantistoj, ni petas ĉiujn nuntempajn esperantistojn, ke ili bonvolu komuniki al ni per poŝtkarteto siajn precizajn adresojn por enpreso en la adresaro.

La tuto supre petata de la bulgaraj esp-istoj estas necesa, por kiom eble plej bona kaj plena kompilo de la jubilea libro dediĉita al nia kvardekjara jubileo de Esperanto-movado en Bulgarujo.

Finfine ni kuraĝas pensi, ke niaj samlandanoj — samideanoj — dezirantaj konservi por ĉiam la karaj historiajn paĝojn de Esperanto-movado en nia lando, bondezire respondos al nia intenco por plej bona honorigo de nia kvardek jara Esperanto-jubileo, kaj ĉiu faros la eblon laŭ siaj povoj.

Ĉio estu sendata al St. Masseroff — str. „Avksenti“ 8 — Kjustendil.

**Ne atendu ke oni rememoru  
al vi, vian devon.**

## БЮДЖЕТНИ БЕЛЕЖКИ.

### РАВНОСМЪТКА

на приходо-разходите на Съюза отъ 1. VIII. 1928 г. до  
31. XI. 1928 г. включително.

ПРИХОДЪ		РАЗХОДЪ	
Наличностъ на 1. XI.	9367·80	1. За „В. Е.“	4244·—
1. Отъ чл. вноски	476·—	2. „ зелената седмица	— —
2. „ продажба стоки	166·—	3. На кредитори	2017·—
3. „ абонам. на „В. Е.“	5258·—	4. Непредвидени	10500·—
4. За зелената седмица	270·—	5. Наемъ канцел.	1000·—
5. „ К. Р.	110·—	6. Канцеларски	411·—
6. Събрани отъ дебитори	— —	7. Заплати	600·—
7. Непредвидени	10167·50	8. Отопление освет.	1000·—
	<u>25915·50</u>		<u>19773</u>
Наличностъ къмъ 1 Декемврий 1928			6142·30

### Фондъ „SAVO“

Отъ брой първи 16,775 лв.

Василь Дечевъ — с. Ресень	20	„
Калина Антонова — с Горско-Сливово [Поповско]	20	„
Дочо Т. Станевъ — Севлиево	50	„
Маринъ Йордановъ — Сливень	20	„
Владимиръ Илиевъ — София	20	„
Събрани презъ конгреса Враца	200	„
	<u>16,905</u>	лв.

### Фондъ „Пострадалитъ Земетресението“

Чрезъ Радославъ Тричковъ — Враца отъ: S-ino Reut r,  
E-ino Dora Schönfelder kaj f-ino Margareta Tröger el Falkenstein  
i. Vogtland (Germanujo) 600 лв.

## ANONCETOJ.

(Vidu la tarifon sur la unua paĝo)

### Korespondo.

**Fraŭlo Canko Jordanov** — teknikisto, ulica „Dorostol“ 26 Ruse (Bulgarujo) deziras korespondi kun fraŭlinoj. Respondo garantiata.

**F-ino Ljuba Dočeva** str. „Alej Vazrajdane“ 72 Ruse, deziras korespondadon kun samideanoj pri diversaj temoj.

**Dek lernantoj** el la fiŝkaptista lernejo deziras korespondi kun gesamideanoj per leteroj kaj p. il. Adreso: „**Verda Ondeto**“.

Fiŝkaptista lernejo — Sozopol.

**S-ro Dimitr N. Minčev**, bankprokuristo en Constanto (Rumanujo) str. „St. Mihaileanu“ 48, deziras korespondi kun bulgariaj fraŭlinoj je temoj diversaj. Korespondas ankaŭ kun filat-listoj.

## LETERKESTO.

**D. K.** en **Ŝ.** La artikolo ricevita. Aparas en la senkvanĵaj.

**Hrima** en la **Stan.** Via tradukaĵo plaĉas al ni. Laŭorde presota.

**B. K. D.** en v. **Porom.** Vi bone trafis la demandon tamen ni jam scribis pri ĝi.

**D. R. K.** en **Sev.** Via artikolo ne aperas, ĉar similan ni aperigis.

Всѣки есперантистѣ може да чете редовно

сп. „**Militrezistanto**“

двуседмиченъ бюлетинъ на Internacio de Militkontraŭuloj въ London. Дава сведения за борбата противъ войната въ цѣль свѣтъ.

**Абонаментъ** — свободно опредѣленъ, минимумъ 10 лева за пощенскитѣ разноски. Който внесе повече, ще подкрепи благородното дѣло на И. Б. В.

Абониране чрезъ „**Посредникъ**“,

бул. „**Дондуковъ**“, 61 — София


**GESAMEDIANOJ!**

До 1 декември за „Albumo de bulgarij esperantistoj“ сж изпратили фотографиитѣ си 130 души. Желаяущитѣ нека побързатѣ. Сроктѣ е до 25 декември 1928 година, следѣ която дата не ще се приематѣ вече абонати.

Цената за 1 албумъ е 75 лв., а за 2 албума — 100 лв.

Всичко да се изпраца на адресъ:  
Международна агенция, ул „П. Мъгловъ“ 4. — Русе.

**Modeloj de Esperanto-Insignoj.**



La insignojn ĉe S-ro DIMITR IVANOV Prista 28 — Ruse.  
Postulu prezaron!

Abonoj por Heroldo de Esperanto, ĉe la sama adreso.

Presejo Dimitr Petroff str. „Gladston“ 6 — Ruse.